



Oficiala Organo
de _____

Flandra _____
Ligo _____
Esperantista _____



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpaga.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag


Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Postĉekkonto: F. E. l. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

En okcidento nenio nova — Remarque.	Fr. 55,—	bind
Leono de Flandrujo — Conscience	55,—	»
La Viro el Francujo — Ivans	29,—	»
Per Balono al la Poluso — Andrée	65,—	»
Viktimoj — J. Baghy	30,—	»
Verdaj Donkiĥotoj — J. Baghy	20,—	»
Tra la Labirinto de la Gramatiko	45,—	»
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50	broŝ.
Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor	10,—	»
La Du Amatinoj — de Musset	7,50	»
La Junulino el Stormyr — Selma Lagerlöf	12,—	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,—	»
Pallietter — F. Timmermans	35,—	»
Dialogoj kaj Komedietoj — E. Dahl	3,75	»
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,—	»
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz.	18,—	»
La Stranga Butiko — R. Schwartz	18,—	»
Verdaj Donkiĥotoj — J. Baghy.	18,—	»
Gaja Lernolibro (ilustrita)	15,—	»
Examenopgaven	12,—	»
Leerboek Dirksen — 2 deelen	18,—	»
Blinda Rozo — H. Conscience	4,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck	5,—	»
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)	2,—	»
Schidlof Zakwoordenboek	30,—	»
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,—	»
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n ^o 1)	10,—	»
Fotografajo D-ro Zamenhof, bela poŝtkarto	2,—	»
INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2,00 fr.		
Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.		
Verda stelo, kun kruco: 2,50 fr.		
Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.		
Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.		
Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.		
Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.		
Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.		

Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Cefredaktoro:
C. Schroeyers
Transvaalstraat, 10
Berchem
Antwerpen



Administranto:
Gerard Debrouwere
Magdalenastr. 29
Kortrijk
Tel.: 1654

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgaj
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpaga.
Poŝtĉeko: 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,
H. VAN DURME kaj aliaj.

Flandra Ligo Esperantista

^AGenerala Kunsido de la Ligo

Ĝi okazos la 5an. de Aprilo, je la 10a matene en Gento, en kafejo
« Georges », Kataloniëstraat, 2.

TAGORDO:

1. Raporto pri la antaŭa kunveno.
2. Propagando kaj Ĉsekursoj.
3. Aliĝo al internacia asocio.
4. Komunikoj de la kongreskomitato.
5. Propono pri financa reorganizo de la Ligo.
6. Organizo de gazetservo.
7. Diversaj.

Diversaj grupoj ne sufiĉe sin interesas pri la ligo vivo. Estas *nepre necese* ke ĉiu grupo sendu delegiton. Sen tio ni ne povas preni firmajn decidojn, la ligo ne povas vivi, kaj grandskala kunlaboro tute ne estas ebla.

La Prezidanto.

Aan de Bondsleden!

Toen onze bond werd opgericht, gebeurde dit niet met het uitsluitend doel de Vlaamsche Esperantisten een eigen organisatie te geven, maar om, geïnspireerd door den geest van den grooten Zamenhof, eigen wegen te gaan.

Zamenhof, immers, zag in Esperanto slechts het middel om hogere doeleinden te bereiken; evenzoo wij, Vlaamsche Esperantisten, die door Esperanto een Vlaamscher Vlaanderen en een vrediger wereld beoogen.


Al komen deze hoofddoeleinden, bij ons dagelijksch streven, soms op het achterplan te staan, toch blijven zij het uiteindelijke doel van onze beweging.

Dergelijke beginsels laten ook voorzien, dat wij niet onverschillig blijven voor het streven van andere cultuurorganisaties in Vlaanderen, welke hetzelfde einddoel beoogen.

Op 22 Maart e. k. richt het verbond V. O. S. (Vlaamsche Oud-Strijders) een massa-betooging in te Brussel om te protesteeren tegen de, voor Vlaanderen, gevaarvolle en eenzijdige Belgische bewapeningspolitiek. Alle Vlaamsche cultuurorganisaties, w. o.: V. T. B., Davidsfonds, Vl. Kruis, Vl. Verbond voor Brussel, Vredes-Aktie, enz., besloten reeds tot deelname opdat deze manifestatie uitgroei tot een algemeen Vlaamsch protest. Zullen wij lijdzaam toezien? Neen! Op 22 Maart, te 9 u. 30, vergaderen de Vl. Esperantisten in het bondslokaal « Breughel », 37, E. Jacquainlaan, Brussel, om gezamenlijk op te stappen achter het spandoek: « Esperanto weert militaire akkoorden ».

Dus: de propaganda flink aangevat opdat ieder afdeeling vertegenwoordigd weze! Voor ieder Vlaamsche Esperantist geldt nu het ordewoord:

NAAR BRUSSEL OP 22 MAART!



7a Flandra Kongreso Gent

30an KAJ 31an DE MAJO KAJ 1an DE
JUNIO 1936.

Mendojn kaj mendojn oni bonvolu fari je P. C. 1530-50 je nomo de Ach. De Maertelaere, Proveniersterstraat, 25, Gent. Korespondojn por la organiza komitato oni sendu al la adreso: Raapstraat, 82, Gent.

KVINA KOMUNIKO

Kotizo: Fr. 12.—.

Glumarkoj trikoloraj: po Fr. 6.— la 100.

Kun ĉi-tiu bulteno ni duan kaj lastan fojon dissendas aliĝilojn, kaj insiste petas baldaŭan enskribon de la partoprenontoj. La urbestraro absolute deziras scii kiomope ni estos, antaŭ ol ĝi volas konsenti pri uzo de salono por nia jara kunsido.

Necesas ankaŭ konigi kiun viziton oni partoprenos, por ke ni povu peti grupan senpagan eniron.

Ni ankaŭ petas sufiĉe fruan enskribon por la ŝipekskurso, ĉar ni devas antaŭmendi la ŝipo(j)n, kiu(j) tute estos rezervata(j) por la kongresanoj. Ankaŭ por la loĝado oni ne tro longtempe atendu. Je Pentekosto komencas la turista sezono, kaj Gent ne havas tro multe da hoteloj en la mezo de la urbo!

Kontraŭe al ĉiujara kutimo, ni ne povos uzi la grupajn fasad-flagojn : festo kaj festeno okazante en la sama loko, la teretaĝo de la Haloj (Raadskelder). Tamen la grupoj kunportu la grupflagojn por la sekvantaro.

Organizoj kiuj deziras fakkunvenojn, rilatu kiel eble plej baldaŭ kun la O. K., antaŭ ol ni kunmetu la definitivan programon.

Gent Grafa Kastelo

La Grafa Kastelo estas unu el la plej interesaj mezepokaj fortikaĵoj de okcidenta Eŭropo.

En la kvarfolio super la enirejo troviĝas :

ANNO IN
CARNATIONIS
M.C.L.XXX

PHILIPPUS, COMES FLANDRIE ET VI-ROMANDIE, FILIUS
THIRICI COMITIS ET CIBILIE
FECIT HOC CAS -
TELLUM COMPONI.

« En la jaro de la homigo 1180, la Grafa Filipo de Flandrujo kaj de Viromandujo, filo de Dideriko kaj de Sibila, konstruigis ĉi-tiun kastelon ».

Fakte Filipo de Alzaco pligrandigis en 1180 fortikaĵon jam ekzistantan. Efektive li plialtigis kastelon de la Xa jarcento por ke ĝi iĝu « Meesten Toren » (Ĉefa Turo) de la nova kastelo.

La nuna Grafa Kastelo subiĝis du sieĝadojn, ambaŭ de la ribelantaj Gentanoj; - la unua en 1302, la alia en 1338; la lasta sub la gvidado de Jakobo Van Artevelde.


Inter la jaroj 1889 kaj 1913 oni riparis kaj rekonstruis multajn partojn de la kastelo, kiu dum la jarcentoj multe estas transformitaj, kaj kies diversaj konstruaĵoj havis plej diversajn destinojn.

Por la vizito de la salonegoj, ĉambroj kaj alkonstruaĵoj de la kastelo, la sekvota vojo estas almontrata pere de numeroj. La plej gravajn ni metas inter krampoj.

La *Enir-konstruaĵo*, superkonstruita enirejo, kiu, en danĝera tempo, estis fermita je ambaŭ flankoj pere de pezaj pordegoj, servis kiel defendo je la eniro de la fortikaĵo. Oni rimarku la paf-kaj jettruojn (1 kaj 2). Tra la interna pordego kaj la portalo oni venas sur la *Antaŭkorton*. Tie oni rimarkas ke ĉiuj konstruaĵoj estas dekstre de la enirejo, kaj ĉi-tio havis militan kialon. Vere, je la momento, kiam la malamiko sukcesis trairi la pordegojn, oni plej facile povis ataki ilin dekstren, ĉar je tiu flanko ili ne povis sin ŝirmi per siaj ŝildoj.

La *Kelo* (3) de la Ĉefa Turo konsistas el la ter-kaj unua-etaĝo de la kastelo de la Xa. jarcento.

Nun oni sekvas la *Remparon* (4) sur la ovala *Ĉirkaŭmuro*. Sur ĝi la gardistaro faris sian gardorondiron kaj ĝi havas dudekunu elstarantajn turojn, unu el ili « *La Kuvo* » estas fermita kaj tegmentita, kaj servis kiel gardoturo. En ĉiuj turoj oni ankaŭ rimarku la jet-kaj paftruojn. Sur la etaĝo de la *Enir-Konstruaĵo* estas la *Kvadrato* (7), kie okazis la turmentado pere de la kolumo, kaj la



Gent. — *Grafa Kastelo* : oni rimarku : la « Kuvo » n sur la antaŭa parto, maldekstre: la « Palacon », meze: la « Cefan Turon », kaj dekstre: la « Enirkonstruaĵo n.

atendejo (8), nomita la « *Suikerlade* » (sukertirkesto) kiu ankaŭ servis kiel malliberejo. Rimarku la krucforman truon.

Laŭ la Remparo oni venas preter la (10) belega *Orienta Alkonstruaĵo* (domo de la Kastelestro kaj Kapelo), la (14) *Egallatera Pintarkaĵo* sub la superkonstruita trairejo kaj tiam oni eniras (15) la *Palacon*. Tra la bela *Akceptejo* (16), kiun oni utiligis en 1807 kiel maŝinejon de kotonfabriko, instalita en la kastelo, oni alvenas al la *Malhela Puto* (18), subtera malliberejo kiu estas 5.50 m. profunda. Nun oni sinsekve vizitas la *Ĉambrojn de la Grafo kaj de la Grafo*. La ĉambro de la Grafo estas aranĝita kiel *Muzeo* de la Grafa Kastelo. Ĉiuspecaj turmentiloj tie estas ekspoziciataj, kiel ankaŭ aliaj objektoj, kiuj rilatas la historion de la Kastelo. La kolekto ĵus pliriĉiĝis per tiu de la forlasita malliberejo, kaj kiu enhavis gilotinson (senkapigilon) kaj diversajn tranĉilojn. La muroj de ĉi-tiuj ĉambroj estas stukumitaj kaj pentritaj samkiel siatempe estis la plej gravaj ĉambro kaj salonegoj de la kastelo.

Plie oni iras tra la *Superkonstruita Trairejo* (22) laŭ la turnanta ŝtuparo al la « Plat » (plata tegmento) de la *Ĉefa Turo*, kie oni havas belan vidon sur la urbon. Antaŭ ol foriri tie-ĉi, oni rimarku la tri (kunligitajn) truegkovrilojn, kiuj kovras grandegan jetruon, tra kiu oni atakis la malamikojn sur la Antaŭkorto. Numeroj 25-26-27 estas kamentuboj de la diversaj etaĝoj. Laŭ ŝtuparo (29) oni alvenas en la *Salonon* de la unua etaĝo, kiu havas, je la orienta flanko, la *Kapelon* de la Grafo.

Denove laŭ ŝtuparo (34) oni venas en la *Salonegon*. Tie-ĉi la Grafoj de Flandrujo okazigis belegajn festenojn, inter aliaj okazis ĉi tie tiu de Filipo la Bonulo en 1445 al la 7a. kanonikaro de la *Ora Saflano* (Gulden Vlies). Plejofte oni en la Salonego publikigis, por

la grafolando Flandrujo, la packontraktojn subskribitajn de la suvereno.

Malsuprenirante al la Antaŭkorto, oni promenas dekstren ĉirkaŭ la Cefa Turo, kaj oni vidas maldekstre, sub la Akceptejo de la Palaco, la *Stalon* de la Kastelestro (42). Trans la truo de la *Teraso* kun *Jeltruo* (44) oni venas sur la *Suprakorton* kaj al la *Staloj de la Grafo* (46), sole staranta kriptoj.

Kiam la Grafa Kortego forlasis la Grafan Kastelon, meze de la XIVa jarcento, oni utiligis ĉi-tiujn stalojn kiel *Turmentejon*.

Ĉi-tie finiĝas la vizito.

(Laŭ « Geïllustreerde Gids van Gent ».)

Jacob Van Artevelde

de *Julius Vuylsteke*. (Gent, 1836-1903.)

Por kiu tiu furioza flu' ?
Popolaj krioj de sangog'u' :
« Mortu l'perfidanto ! »
Sovaĝe krias nun la band'
por vir' kiu kliniĝis genu'
kiel savanto
de l' patroland'.

« Ĉu sangon, mian sangon ? Ĉu mi ĝin rifuzis ?
» Ho, kiu kontraŭstaris, kiam vin konfuzis
» mizero kaj perforto, Grafan venĝon ? Kiu
» liberstandardon levis, bruston ja al ĉiu
» malnobla mortigist' prezentis ? Dum atako
» la morton serĉis antaŭ l'muroj de Tornako ? (2)
» Kun li vi tiam ĵuris resti ĉiam. Ĉu
» la ĉefon ŝparis nur la glava ŝtal'
» por ke konspiru vi por lia fal' ? »



Gent. — *Sta. Faraildo-placo* : domoj el la 16a kaj 17a jarcento.

Sed en furioza popola flu'
resonas kri' de sangoĝu' :
« Mortigu l' perfidanton ! »
« Morton ! » nun estas la kria demand'
de l'popol' salutinte lin ofte per bru'
kiel savanton
de l' patroland'.

« Pripensu l' timan tempon, patrujo malvenkinta,
» Pripensu l' gajajn tagojn, perfort', malsat', cedinta.
» Ho, aŭdas mi ĝojkantojn, vibrantajn en aer' :
» Li vivu l'saĝa ĉefo ! Ni ĝuas pri liber',
» katenoj ekrompiĝis,
» venĝita l' malhonor'
» la superfort' fortigis,
» komerc' en rea flor' ;
» el cindro sin relevas
» Flandruj' : kun tim', respekt',
» ĝin ĉiuj glori devas,
» pro fort' kaj luksreflekt' ! »

« Sufiĉas nun !
» Jen via pun' !
» Tro longe regis nin la perfidant'
» de supre — Batu ĝismorte !
» Ja morton al la insidant' ».

Kriegas konfuze en rond'
la koler'
proksimen kaj forte,
furioze plaŭdas popola ond'
La pord' batfalas sur ter',
hakiloj brilas..... kaj antaŭ morto
de l' lipoj glitas lasta vorto :
« Patrujon savu, Di', de l' fal'...
» La vivon donus mi, popolo,
» sur batalkamp' pro propra volo ;
» Sed morti nun per via ŝtal' !...»

Finita delir'
Buĉita la vir'
ja kiel perfidanto !
En sia sang'banante nun
li kuŝas en grand',
al kiu salutis popola komun'
kiel savanto
de l' patroland'.

Trad. TYNEVERUM.

(1) Naskiĝis en 1290, estis famkonata Genta popolgvidanto; dum sep jaroj regis la urbon kaj Flandrujon (1338-1345). False kulpigita pri perfido, li estas mortigita la 24an. de Julio 1345. Al li oni starigis monumenton, meze de la Vendredovendejo en 1863.

(2) Doornik.

Kio estas Cseh-Metodo?

Unue, ĉar la Cseh-kursoj havas en Flandrujo la saman sukceson, kiel en aliaj landoj, kaj due ĉar estas mullaj inter la gelegantoj de Flandra Esperantisto kiuj fakte ne scias, kio estas la Cseh-metodo, ŝajnas al mi ne superflue pli malpli detale klarigi la ecojn de tiu instrumaniero.

La Cseh-metodo estiĝis en 1920, kiam Sinjoro Andreo Cseh estis pastro en la Rumana urbo Sibiu. Oni invitis lin gvidi Esperantan kurson por la enloĝantoj de tiu urbo.

Sed la malfacilaĵoj estis grandaj. Unue la publiko konsistis el diverslingvanoj, due, pro la ĵus fininta milito, lernolibroj ne estis haveblaj en Rumanujo, nek mendeblaj eksterlande.

Restis do kiel iloj por la instruado, kredo kaj tabulo por la instruisto, papero kaj kraĵono por la gelernantoj.

En la komenco estis uzataj objektoj, plej proksimaj al la kursanoj, instruataj la plej facilaj gramatikajoj. Tiel, paŝon post paŝo, oni daŭrigis kaj post dudek lecionoj la kursanoj kapablis legi, paroli kaj skribi.

La kurso montriĝis tiel sukcesa ke oni aranĝis similajn kursojn en la tuta lando. Poste venis ankaŭ invitoj el eksterlando kaj baldaŭ komencis la antaŭaj kursanoj de Andreo Cseh mem instrui. Kvankam oni komence opiniis ke la sukceso nur dependas de la personeco de Andreo Cseh mem, la malo baldaŭ montriĝis. La disĉiploj same sukcese instruis kiel la aŭtoro mem.

Nuntempe la Cseh-metodo preskaŭ en ĉiuj landoj triumfis.

Kvankam oni plej bone komprenas la avantaĝojn de la metodo, kiam oni mem partoprenas en Cseh-metoda kurso, mi tamen klarigos al vi la plej gravajn principojn.

Se eble, kursoj estu gvidataj de eksterlanda instruisto. Unue eksterlandano pli bone sentas la influon de la nacia lingvo, ĉar li ne komprenas la frazojn, faratajn laŭ nacilingvaj idiotismoj.

Plie por la kursanoj estas kuraĝige, ke ili ekde la komenco povas interkompreniĝi kun eksterlandano.

Kaj krom tio la propaganda valoro estas granda. Mi mem spertis tion en Duffel. Estas preskaŭ certe, ke tie ĝis nun neniam venis Rumano, do kompreneble multaj venis por rigardi tiun novaĵon. La rezultato estis, ke la tiea kurso estas la plej granda el ĉiuj.

Car mi ne komprenas la Nederlandan lingvon, la gelernantoj estas devigataj paroli al mi nur Esperanton, kio kaŭzas ke ili kutimiĝas pensi en Esperanto.

Alia principo estas la neuzado de lernolibro. Ĉiu leciono estas, pro tio, surprizo por la lernantoj. Ĉiu nova vorto aŭ gramatikaĵo estas klarigata per la jam instruita parto.

La malfacilaĵo, kiun oni spertis en preskaŭ ĉiuj kursoj, nome teni la kursanoj ĝis la fino, estas absolute venkata pere de la Cseh-metodo.

La Cseh-kursoj ĝenerale finiĝas kun pli multe da lernantoj ol kun kiom ili komenciĝis. Tion oni povas kompreni vidinte tutan kurson.

En Cseh-kurso oni ne nur lernas Esperanton, sed samtempe pasigas agrablan vesperon.

Tiel oni tenas ankaŭ tiujn, kiuj ne progresas.

Kontraŭuloj de Cseh-metodo ofte diras, ke oni ne sufiĉe profunde lernas la lingvon en Cseh-kurso.

Fakto estas, ke se oni volas esti bona Esperantisto, oni nepre devas sekvi daŭrigan kurson. Sed ĉu tiuj, kiuj sekvis elementan gramatikan kurson, estas bonaj Esperantistoj?

Ofte mi spertis, ke Esperantistoj, kiuj bonege scias ĉiujn gramatikajn regulojn, ne povas uzi ilin en la praktiko kaj tute ne kapablas fari simplan konversacion.

Andreo Cseh mem diris pri tio, ke ekzistas du specoj de instruado, nome: la scienca instruado, kie celas instrui al kelkaj homo plej perfekte la lingvon, kaj la propaganda instruado, per kiu oni atingas kiel eble plej grandnombran publikon, kaj instruas al ĝi la elementan parton de la gramatiko en mallonga tempo, tiel, ke la kursanoj poste entuziasme daŭrigas studadon kaj propagandon.

Fine nia celo ne estas kulturi filologojn, sed konvinki ĉiujn pri la beleco kaj graveco de niaj lingvo kaj idealoj; kaj por tio ili antaŭ ĉio devas koni la lingvon.

Mi opinias, ke mi sufiĉe klare montris la avantaĝojn de la Cseh-metodo. Plie la nunaj kursoj mem pruvas ilin.

Sed ĉiu komprenos, ke kvankam la metodo estas bonega, oni devas fari la necesan propagandon por altiri la homojn al la kursoj, kaj en tiu rilato mi havas urĝan peton al la Antverpenaj Esperantistoj.

Ili eble scias, ke mi intencas post la fino de la nunaj kursoj komenci novan serion en Antverpeno kaj cirkaŭaĵoj. Pro tio mi insiste petas, ke ĉiuj jam nun komencu la propagandon por tiuj kursoj. Kun kelkaj gvidantoj de la movado en Antverpeno mi jam priparolis la starigon de konstanta reprezentantaro, same kiel en Bruselo. Tiu reprezentantaro povos fari taŭgan laboron por la kursoj.

Ĉar la organizado de kursoj en granda urbo kiel Antverpeno postulas multe da laboro, mi rekomendas al ĉiuj ne prokrasti, sed tuj komenci la propagandon. Komprenoble mi volonte kunlaboros. La tiea Esperantistaro plej bone konas la lokajn cirkonstancojn, mi povas doni konsilojn pro miaj spertoj pri organizado.

Kaj mi estas absolute konvinkita, ke kiam ni ĉiuj kunlaboras, ankaŭ en Antverpeno ni havos sukcesplenajn kursojn. La verdigado de via lando vere urĝas. Ni ne plu perdu tempon. Ĉiu momento devas esti eluzata, ĉar nur tiam ni atingos nian celon.

Dum mia restado en Belgujo mi spertis, ke estas ege facile fari propagandon. La gazetaro estas tre favora. Diversaj inter vi verŝajne vidis la fotojn kaj artikolon en la revuo «*Ons Land*». Tio estas sekve de simpla letero de Sro. Rainson, via vigla prezidanto. Se nur estas la firma volo atingi ion, oni ankaŭ atingas. Neniam diru pri io, ke ĝi ne estas ebla antaŭ ol provi la eblecon.

Fine mi petas, ke ĉiuj, kiuj vere deziras labori aŭ havas taŭgajn ideojn, senprokraste skribu al mi; por ke formiĝu kiel eble plej baldaŭ rondo de fervoraj propagandistoj.

Mi atendas amason da leteroj. Al la laboro !!!!

Jos. ORNSTEIN,
Hombeekschesteenweg, 54, Mechelen.

TIEL...

Kiel suno ĉiun tagon
de la ora orient',
super neĝkovritaj montoj
vagas al la okcident' ;

Kiel riveret' en valo,
kvazaŭ brila silkruband',
al la malproksima maro,
glitas tra la tuta land' ;

Kiel ludetantaj nuboj,
kiuj ŝvebas ĉe l' ciel',
ĉiam sen ripoz' antaŭen,
al la nekonata cel' ;

Kiel birdoj, kiuj flugas
dum la bela jarsezon',
de varmega sud' al nordo,
al pli milda region' ,

Tiel mia sola penso,
ĉiam ĉarma karulin',
vagas, glitas, ŝvebas, flugas,
... kaj nur vi haltigas ĝin !

Montana

Juul KARNAS.

Momenton ni ridu !

POST UNU JARO.

Ili estis geedzigintaj unu jaron.

Li. — Via patro vere longe atendas por pagi al ni vian doton!

Ŝi. — Mia kara, ne estu maljusta: li donas ĝin iom post iom.

Li. — Tio estas ebla, sed mi, mi prenis vin entute, en unu fojo!

LA LERNEJO DE LA SOLDATO.

— « Kiu havas la plej altan gradon en la regimento ? » demandis la kaporalo al novulo.

— « La kolonelo. »

— « Kaj kiu estas tuj sub li ? »

— « Lia ĉevalo, mia kaporalo. »

EN LA FOIRO

La mastro de ŝovaĝaj bestoj, en la foiro de urbeto, elmontris sian bestkolekton, kaj lia edzino, en apuda urbeto samtempe elmontris aliajn bestojn. Post mallonga tempo revenis ĉe la edzo la edzino kun sia bestaro, kaj tial li afiŝis :

« Pro la alveno de mia edzino, la sovaĝa bestaro pligrandiĝis. »

Sur la bulvarado, inter amikoj ;

— Ŝi estas rava, sed kiamaniere ŝin alparoli.

— Proponu al ŝi la edziĝon aŭ... kafon kun kremo.

Diversaĵoj

En Utrecht okazis du paroladoj sub la protekto de grava honora komitato, kiu ne estis surpapera sed vere aktive kunhelpanta, ial ĉar multaj el ili ne nur ĉeestis la paroladojn, sed ankaŭ tiom interesiĝis, ke ili aŭ mem studas Esperanton aŭ anoncis sin en la kurso. La direktoj de la fervojoj kaj de la poŝto eĉ rondiris cirkulerojn inter la oficistaro, rekomdante la viziton de la Cseh-kurso. Antaŭ kaj post la paroladoj aperis proksimume cent gazetartikoloj.

Unu el la plej gravaj punktoj de ĉi tiu bela sukceso estas ke la ĉefredaktoro de « Utrechtsche Nieuwsblad », S-ro D-ro Goedhart sin anoncis en la kurso kaj ekflamigis por mia bela lingvo. La plua sukceso estas la enkonduko de Esperanto-rubriko en ĉi tiu gazeto.

* * *

Lia Moŝto P. Hopmans, episkopo de Breda, ĉeestis al propaganda kunveno de la klubo « Por Mondpaco » en Ginneken, la 15-an de Decembro, kaj tie deklaris interalie :

« Mi tre ĝojas, ke mi povas ĉeesti ĉi tiun kunvenon. Mi ĉi tie multe lernis, kaj kunportas de ĉi tie la firman konvinkon, ke Esperanto estas urĝe necesa por la Sankta Eklezio. Mi donas al vi la certigon, ke estonte mi plenvole apogos la Esperanto-movadon. Mi nur bedaŭras, ke mi en la estinto tro malmulte subtenis tiun movadon. — Miaj pastroj kaj diocezanoj, apogu la katolikan Esperanto-movadon. Mi fidus, ke post malmultaj jaroj la katolika Esperanto-movado estos disvastiĝinta tra mia tuta episkopejo.

* * *

LA LYON'A FOIRO ELDONAS NOVAJN PRESAĴOJN EN ESPERANTO.

La Lyon'a Foiro ĵus sendis al ni :

1^o) Novan afiŝon kun esp. teksto; ĝi estas kvinkolora kaj mezuras 60 cm. × 100 cm.

2^o) Novan prospekton en Esperanto. Ĝi estas sespaga, dukolora kaj ilustrita per desegnaĵoj kaj fotografajoj.

3^o) Belan kvardekpaĝan broŝuron eldonitan de la Lyon'a Turisma Oficejo kun klarigoj en Esperanto.

Al ĉiu petanto, la Lyon'a Foiro sendos senpage tiujn presajojn, kune kun kelkaj sorbpaperoj kaj ilustritaj poŝtkartoj.

Sin turni: Foire de Lyon, Esperanto-Fako, Rue Ménestrier, Lyon, Francujo.

* * *

Fondiĝis « Esperanto-Asocio de Ĉeĥoslovaka Respubliko » neŭtrala nacia centro. La Germana Ligo ne estis por la unuecigo kaj restos memstara. En tiu lando do sin prezentas la sama situacio kiel ĉe ni.

Fervojaventuro

Iam, S-ro Derschatta, Ministro por fervoja trafiko en Aŭstrujo-Hungarujo, prenis lokon en vagonaro en Wien por direkti sin al proksima loko. S-ro Derschatta, estante nefumanto, tre malŝatis la tabakfumon kaj estis al li tre malagrabla rimarki, post kiam la va-

gonaro ekmarŝis, ke kunvojaĝanto prenis sian cigarujon, atente elektis cigaron kaj ekbruligis ĝin. S-ro Derschatta tuselis, tuisis ion pli laŭte kaj fine lin ekkaptis atako de tusado. Lia kunvojaĝanto daŭrigis ĝui sian cigaron.

— Sinjoro, fine diris S-ro Derschatta, omi devas atentigi vin, ke ni estas en kupeo por nefumantoj !

La alia vojaĝanto elblovis dikan fumnubon kaj trankvile diris :

— Estas al mi indiferenta !

— Sed Sinjoro, la fervojadministracio...

Kun nerezistebla trankvileco respondis la alia :

— Ne estas al mi zorgo la fervojadministracio !

— Nu, Sinjoro ! Ĉu mi povas diri tiam ke mi estas Dro. Derschatta, Ministro de fervojoj en Aŭstrujo-Hungarujo

— Ĉu vere vi estas la fervojministro ?

— Jes, sinjoro, mi havas la honoron, jen mia nomkarto.

Kun ŝajne neĝenebla animtrankvileco kaj la cigaro ankoraŭ ĉiam inter la lipoj, la fumanto akceptis la karteton, ŝovis ĝin, post rigardo, en la poŝon, sed intertempe li daŭrigis fumi kiel fabriktubo.

Post kelkaj sekundoj de silento, li prenis la cigaron el la buŝo, rigardis la Ministron kaj diris kun la sama trankvileco :

— Nu, nu, vi do estas la ministro de fervojoj ? Permesu ! sed mi mokas pri vi.

La ministro preskaŭ ne povante enteni sian furiozon, silentis, ĝis kiam la vagonaro haltis en stacio. Apenaŭ la pordo estis malfermita, ke li vokis la staciestron.

— Staciestro, ĉi tiu sinjoro restas fumanta, kvankam mi jam plurfoje diris, ke ni estas en kupeo por nefumantoj. Ĉu vi volas noti la nomon de tiu sinjoro, m. p.

— Vian nomon, sinjoro, demandis la staciestro.

— Jen mia nomkarto, diris la trankvila fumanto.

Senhezite, la vojaĝanto prenis el la poŝo, karteton, trandonis ĝin al la staciestro kaj ĉi-tiu, apenaŭ vidante la nomon klinis sin kiel faldtranĉilo kaj balbutis :

— Pardonu al mi, Via Moŝto, mi ne sciis, kun kiu mi havis la honoron paroli. Se tiu sinjoro — « tiu sinjoro » estis la vera ministro — ankoraŭ plue ĝenos vin, mi devigos lin eliri.

Kaj la vagonaro reforveturis antaŭ ol la ministro ion povis diri.

Ĝis la sekvonta stacio la Ministro havis la tempon por pripensi, ke estas danĝere doni sian propran nomkarton al fremdaj personoj.

Tradukis J. GENAR.

NOVAJ SUKCESOJ EN FLANDRUJO

« DE BADGAST » KAJ ESPERANTO.

« De Badgast » estas la gazeto de la Flandra turista Ligo por la marbordo kaj samtempe la organo de la flandraj somergastoj ĉe la Norda Maro.

Ĝi aperas ĉiusemajne dum la bansezono kaj pli malofte dumvintre. Tiu gazeto estas grava por ni, ĉar ĝi estas legata de personoj — gastigantoj kaj gastoj — kiuj ĉirkaŭ si vidas daŭre la lingvan divers-econ. Laŭ iniciato de nia helpema samideano, Sro. H. Veys de Nieuw-

poort, « De Badgast » en sia januara numero enkondukis esperanto-rubrikon. Se multaj esperantistoj gratulos kaj se kelkaj abonos, tiu rubriko estos daŭrigata en ĉiu numero.

Ni ĉiuj interesigas pri la marbordo kaj la bangasta vivo kaj ankaŭ pri Esperanto. La abono de « De Badgast » kostas nur Fr. 7.— por unu jaro. Konkludo : la afero devas sukcesi.

...Ĉkkonto 690.84 de A. Vervaeke, 50, Jozef II straat, Oostende. ...

« Flandra Esperantisto » kore gratulas Sinjoron H. Veys pro lia bela ideo kaj ĝia efektivigo.

LA GENTAJ STUDENTOJ KAJ ESPERANTO.

Kun granda ĝojo ni sciigis, ke la 12an de Februaro estas fondita Esperanto-grupo inter la studentoj-Esperantistoj de la Genta Universitato. Ĝia nomo estas : « Studenta Grupo Esperantista ». La prezidanto estas sam. Fr. Mortelmans. Verŝajne, S. G. E. partoprenos al la 7a Flandra Kongreso kaj baldaŭ komencos kurso, gvidota de sam. Edg. Verheyden, por la Gentaj studentoj. La prezidanto kaj la kursgvidonto estas simpatiaj kaj senlancaj membroj de Flandrema Grupo, studentaj en Gent. Alia tre agema kaj valorplena membro estas ankaŭ sam. Fern. Roose de la Bruĝa Esp. Grupo.

Ili intencas ankaŭ sin okupi pri la tradukado de taŭgaj verkoj, kiuj estos publikigataj en Fl. E., en kies servo ili metos sian tutan agadon.

Fl. L. E. sentas sin tre feliĉa, povante saluti tiun novbakitan grupon kaj deziras al ĝi grandan sukceson kaj multajn jarojn.

POR NIA PROPRA SKRIBMASINO.

Z. V. D. C. 3Fr.; G. Ockerman 2Fr.; J. Cantaert 2Fr.; O. T'Sobbel 2Fr.; M. J. Geenens 2Fr.; Marius Geenens 2 Fr.; Esperanto venkos 5Fr.; M. Van Boxelaer 5Fr.; M. Naster 5Fr.; L. Vercammen 10Fr.; J. Plison 10Fr.; M. Lycke 3Fr.; A. B. Sanders 10Fr.; Ronsano 5Fr.; Jet 10Fr.; Esperanto Grupo Kortrijk 50Fr.; H. Rainson 10Fr.; Lernanto el Antverpeno 10Fr.; P. Van der Poel 10Fr.; Jos. Ornstein N. E. L. E. Bruselo 25Fr.

POR NIA REVUO.

De Boes 20Fr.; G. Leenaers 20Fr.; Jet 10Fr.; Novjardonaco Flandrema Grupo 100Fr.; Bassleer-Sergeant 10Fr.

Bibliografio

(Duope ricevitaĵajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitaĵajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ ranto-Instituto estos ignorataj.) Flandra Espe-

CU MI DORMAS «LIBERA» DE SANDETRUAJ TERRADIOJ — de J. G. Mieremet, esperantigis el la Nederlanda lingvo Marie E. Giltay, Parkweg, 99, Voorburg. 15 paĝoj, 6 desegnaĵoj. Prezo : 0.40 sv. fr. aŭ 3 respondkuponoj.

Bele prezentita broŝuro, en kiu la verkinto pravas konvinki la leganton kiel ekstreme grave estas ne nur, ke oni scias, ĉu oni dormas « libere », sed ankaŭ, ĉu oni « libere » sidas aŭ laboras, ekster la influo de la terradioj, kiuj povas havi fatalan influon sur

la sanstato, kaj kondukas de nazkataro aŭ kapdoloro ĝis kancero aŭ epilepsio.

Oni diras ke en Nederlando la temo estas tre aktuala.

Divena vergo servas kiel esplorilo por trovi kie troviĝas radioj. Verg-iranto povas precize indiki la lokon, kie la lito de mortinto pro kancero devas esti starinta, kvankam li antaŭe nenion sciis pri la aranĝo de la domo.

Nekrologo

CHARLES RICHET, unu el la plej famaj scienculoj el la mondo, membro de la Franca Instituto, kiu multe servis al Esperanto precipe dum la pionira periodo, mortis, je aĝo okdekkvin-jara.

La 4-an de Februaro, mortis en Geneve, S-RO ROBERT KREUZ, direktoro de U. E. A. Estos certe terura bato por tiu asocio, precipe nun kiam ĝi tiom bezonegas kapablan gvidanton.

Mortis la 15an de Februaro en Oostende, SINO ALYDA BRACKMAN-CABOOTER, patrino de nia ŝatata membrino Rachel Cabooter el Oostende.

Antaŭ du monatoj, la morto trafis la saman familion, en ilia filo kaj frato.

Ni prezentas al la funebrantaj familioj, niajn plej sincerajn kondolencojn.

Grupa Vivo

ANTWERPEN. — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

En la alloga festsalono « De Ton », nia grupo organizis, la 11an de Januaro, artvesperon. Ni certigis nin la kunlaboron de la fama « Trio Stenzel » kiu je artplena maniero aŭdigis elekton de germanaj popolkantoj. La tri voĉoj, soprano, alto kaj baritono esprimis sin artplene kaj formis, kvazaŭ kunfanditan tutajon. Tiam, ili ankaŭ akiris, ĉe la koncerto de siaj seriozaj kaj gajhumoraj kantoj, grandegan ovacion. La vespero estis malfermata per mandolin-kaj gitar-kvarteto. Kiel intermezo Sro. Th. Michiels aŭdigis kelkajn temperamentplenajn fragmentojn sur fortepiano. Alterne sin sekvis muziko kaj kantoj kaj je la 11a, tiu-ĉi art-kaj ĝojplena vespero estis fermata per agrabla balo, kiu daŭris ĝis la 2a. La 15an de Januaro okazis la jara estrarelekto. Novaj kandidatoj estis tre maloftaj. Nia Prezidanto, kiu anoncis sian eksiĝon, revenis, post multaj kaj bruaj diskutoj kaj post insisto de ĉiuj ĉeestantoj, je sia decido kaj reakceptis la prezidantecon por duona jaro. La nuna estraro konsistas el Sro. J. Genar : prezidanto, Sro. R. Van Durme : vic-prezidanto, Sro. P. Van Peel : kasisto, Sro. J. Vandersteen : sekretario, Fino. R. Mertens : 2a. sekretario, Sro. F. Volders : festdirektoro, kaj Sr. J. Van Geel : konsilanto. La vojo al la progreso do estas denove certigita por nia grupo.

La 5an. de Februaro nia amiko Karl Moro, eksterlandano, faris por atente-aŭskultanta kunveno, interesan paroladon pri « Per

Esperanto tra ok landoj ». En klaraj kaj bonaj termoj li parolis pri sia laboro kaj okazintaĵoj en la diversaj landoj, kiujn li travojaĝis. Sro. Karl fermis sian paroladon esprimante la deziron ke la internacia movado ĉiam kresku kaj plifortiĝu je prospero de ĉiuj. La 9an. de Februaro nia grupo vizitis la interesan ekspozicion de la novbakitaj « FORD » modeloj, aranĝita de la antverpena Ford-dealer O. Permeke, okaze de la 25-jara ekzistado de lia firmo. La plej kurioza de tiu-ĉi ekspozicio estis la parolanta ĉasio, vere unika.

Dum la monato Marto la grupo vizitis la de la provinco organizita ekspozicion pri « La homo »; tre lerniga kaj interese ga por ĉiuj. Enirkarto kun gvidlibro je plimalmultigita prezo estas havebla ĉe nia kasisto ĝis elĉerpiĝo de nia provizo.

MECHELEN. — LA ESTONTO.

Tiun-ĉi vintron la grupa vivo plivigliĝis per nia Cseh-kurso Cseh-kurso el si mem estas tre interesa, tre fruktodona, tre gaja eĉ, kaj laŭ Esperanta vidpunkto tute ne teda temo por ligaj kunvenoj. Rigardo tra la kuraĝaj vicoj de gelernantoj vin tuj certigas ke estas ne nur intereso, sed ankaŭ kun ĝojo ke ili eklernas nian lingvon.

La unua leciono tute ne nerimarkite preterpasis. Nin vizitis la Inspektoro de Instruado Sro. Michiels, kiu ankaŭ flue parolas Esperanton, kaj du grandaj flandraj revuoj « Ons Land » kaj « De Stad » fotografis pli ol unu bildon de la instruisto Ornstein, de la iniciantoj kaj de la gelernantoj, kaj aperigis la bildojn kun tre laŭdanta, entuziasmiga komentario. Malfeliĉe la « muroj inter la popoloj » ege kontraŭstaris niajn klopodojn, Sro. Ornstein pro pasport — kaj vizomizeroj devis revojaĝi al Nederlando kaj tie atendi... ĝis en Brussel oni preparu la postulatajn paperojn ! Tiuokaze ni antaŭ ĉio devas danki nian grupan kaj ankaŭ ligan prezidanton, Sro. Rainson, kiu prenis sur sin la taskon intertempe daŭrigi la kurson en sep lokoj, krom sia jam plenplena ĉiutaga lernejoborodo. Estas vera superhoma laboro.

Ke ĉiuj post la kurso iĝu membroj de la Flandra Ligo, tio certe estus la plej bela rekompenco por nia senlaca prezidanto.

BRUSSEL. — N. E. L. E.

Niaj kursanoj kun sama fervoro kaj same multnombraj kiel dum la unua leciono, sekvas regule nian Ĉe-kurson. Nia grupestraro organizos intiman kursifinan vesperon, kiun ĉeestos ankaŭ la kursanoj el Vilvoorde.

Programo de niaj Mardaj kunvenoj dum Marto :

Mardon la 3-an : Tradukvespero.

Mardon la 10-an : Perfektiga Ekzerco.

Mardon la 17-an : Distra Vespero.

Mardon la 24-an : Legvespero (ne forgesu kunporti F. E.).

Mardon la 31-an : Perfektiga Ekzerco.

Montru vian intereson per via nepra ĉeesto !

Laŭ la alvoko de la Ligo, ni grupe partoprenos la manifestacion de V. O. S. la 22-an de Marto. Niaj verdaj pedalkavaliroj bone notu ke en la liga sidejo « Breughel » estos rezervita loko por remizi biciklojn.

OSTENDA GRUPO ESPERANTISTA.

La 19an. de Januaro ni estis invititaj de la Esperantista Grupo Nieuwpoort, okaze de la parolado donita de Sro. Ornstein, Cseh-instruisto. Dum la posttagmezo ni ĉeestis dekoje la provlecionon laŭ la Cseh-metodo, kiu tre plaĉis al ni. Ĉeestis i. a. ankaŭ delegitoj el Diĉmuide kaj Bruĝo. Ĉar la afero, koncernante la organizon de Cseh-kursoj en Flandrujo tre interesas nin, grupo Nieuwpoort subite ĵetis la proponon por organizi, ankoraŭ antaŭ la somero, Cseh-kurson inter la diversaj Esperantistaj grupoj ĉirkaŭ la marbordo. Sro. Ornstein donis al ni la koncernantajn informojn, sed bedaŭrinde nur je Pasko, la organizo povus komenci. Pasko estas malfavora tempo tiel por Ostendo kiel por Bruĝo. Post interparolado ni opiniis ke estas pli favore atendi ĝis la venonta vintro kiel ni antaŭe decidis. Certe estas ke ni ne dubas ke Flandrujo havos siajn Cseh-kursojn.

La sekvintan Dimanĉon la Bruĝa grupo invitis nin ĉeesti ilian feston, okaze de la honorigo al sia honorprezidanto. Parolado, teatraĵoj kaj balo, ĉio bone sukcesis kaj ni bedaŭris ke ni tiel frue devis foriri. Post adiaŭo kaj salutvorto ni forlasis la Bruĝan samideanojn, esperante baldaŭ revidi la Bruĝajn amikojn.

RONSE. — LA PACA STELO.

La plej granda novaĵo por ĉiuj niaj membroj kaj amikoj esperantistoj estas la « Oficiala Monsubteno » kium la urbestro decidis doni al nia loka grupo. Ĉi ciferas je Fr.300.— Ni ne povas preterlasi tiun kuraĝilon ne dirante ĉi tie koran, publikan kaj multan dankon al nia simpatia honormembro Sro. Ferla, kiu per sia grava influo akiris tiun belan sukceson.

Rilate al nia biblioteko ni sciigas al nia samideano ke ĝi pliriĉiĝis per pliaj legindaj volumoj kaj gravaj verkoj de plej diversaj famkonataj verkistoj.

La estraro baldaŭ diskonigos sezonan programon por la ekskursoj Ĉies gusto estos respektata kaj ni intencas organizi tiajn, ke la plej - malfacile - kontentigeblaj membroj trovos ion por partopreni al unu el niaj ekskursoj, ĉu piede, ĉu bicikle, ĉu aŭtobuse, ĉu vagonare.

La dua listeto estos forsendata al la organizantoj de mia kara 7a nacia Flandra kongreso.

Al la solvintoj (serĉemuloj)

Estimataj Solvintoj,

Mi ĉokore dankas ĉiujn ensendintojn, pro la bonvolemo kiun vi havis por solvi la Kruĉvorton. Mi esperas ke vi daŭrigos senlace. Preskaŭ ĉiuj ensendintoj akiris la maksimumon de la poentoj. Laŭ tio mi faras la konkludon ke la enigmo estis tro facila. En la estonto mi do iomete pli malfaciligos ilin por doni al la bonaj esperantistoj decan laboron. Tamen, por ne malkuraĝigi la pli malsertajn solvontojn, ricevos partoprenrajton al la premilotumado, ĉiuj ensendontoj, kiuj akiros la ok dekonajn de la poentoj. Por kuraĝigi la spertulojn, mi komencas jarbatalon kun premio por la solvintoj kiuj dum la tuta jaro ensendos, ĉiujn enigmosolvojn sen eraroj.

Kaj nun laboru kuraĝe ! Vi konstatos post kelkaj monatoj ke vi almenaŭ duobligis vian spiritan vortaron.

ENIGMO.

N. B. — Mi faras alvokon al ĉiuj bonvolemluloj helpi min per mondonacoj por aĉeti pli multajn kaj pli bonajn premiojn. Ankaŭ premioj en naturo estos akceptataj.

La angulo de la serĉemuloj

Al la ensendinto de la plej bonaj solvoj, ni promesas belan premion. Ĉiu solvita vorto valoras por 1 poento. Le premio estos do por tiu, kiu akiros la plej altan nombron da trovitaj vortoj.

La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5a de Aprilo rekte al S.ro P. Volders — Bredastraat 94 — Antwerpen. Bonan ŝancon!

PROBLEMO 3

MAGIA STUPARO

Uzi ĉiam la samajn literojn sed en malsama ordo kaj ĉiufoje plimultiĝi la vortojn je unu litero ĉe ĉiu ŝtupo.



1. konsonanto.
2. denove (R).
3. planedo (R).
4. tiri (R).
5. maldoni (R).
6. denove bedaŭri (R).
7. eniro perforta.
8. vipero.
9. idealo.

SOLVO DE PROBLEMO 1

E	S	P	E	R	O	A	K	A	P	A	R		
K	■	O	V	O	■	A	■	A	G	O	■	E	
S	P	■	A	N	A	N	A	S	O	■	L	D	
T	I	E	■	K	E	G	L	O	■	P	I	A	
E	R	P	I	■	R	I	D	■	P	O	R	K	
R	■	I	R	U	■	L	■	T	E	D	■	T	
■	A	Z	O	T	O	■	C	I	N	A	M	■	
P	■	O	N	I	■	L	■	P	I	G	■	A	
R	A	D	I	■	S	U	B	■	K	R	O	M	
E	M	O	■	I	O	M	E	T	■	O	K	A	
P	O	■	I	R	L	A	N	D	O	■	A	T	
A	■	T	R	A	■	D	■	I	R	O	■	O	
R	A	K	O	N	T	■	■	E	K	F	L	A	R

La feliĉa gajninto de la premio por la bona solvo de la krucenigmo 1 (de la monato Januaro), estas Sro. Pittoors, el Deurne.

La premio estas je lia dispono en la ejo de Flandrema Grupo, « Nieuwe Carnot », Carnotstraat, Antwerpen.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap (met maandblad): 20 fr. per jaar.

Aangesloten groepen:

Aalst: « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Groote Markt; vergaderingen elken Woensdag avond.
Aarschot: « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 70, vergaderingen elken Woensdag avond.
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Guido Gezellelaan, 15.
Brussel: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquainlaan, 37; vergaderingen elken Dinsdag avond.
Edegem: « Nia Idealo », Verbindingsstraat, 9.
Hamme: « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elken Woensdag avond.
Kortrijk: « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elken Woensdag avond.
Lede: « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60.
Leuven: « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.
Lichtervelde: Sekretariaat, Weststraat, 47.
Mechelen: « La Estonto », vergadering elken Vrijdag te 20 uur, Hombeeksche steenweg, 54.
Oostende: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.
Oudenaarde: « Al Paco »; sekretariaat: Nederstraat, 8.
Roeselare: « Ruselara Grupo Esperantista »; Statedreef, 177.
St. Niklaas: « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

Alle inlichtingen verstrekken verder te:

Diksmuide: M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.
Gent: Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stasegemstraat.
Hoboken: J. de Groot Caronstraat, 31.
Meenen: K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.
Millen (Tongeren): L. Geukens, Langstraat.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.
Thielt: R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.
Wilrijk: Daniel Mortelmans, Egied Segerslaan, 14.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



Varbu Abonantojn kaj Anoncantojn !

Speciale rekomendita Restoracio

„ La Renommée ”

St. Baafplaats, 3 — GENT — Tel. : 120.12

apud la Belfrido.

Estro VAN DER PLANCKEN persone direktas la kuirejon kaj prizorgos la festenon kaj lundan tagmanĝon de la 7a FLANDRA ESPERANTISTA KONGRESO

Huis aanbevolen door V. T. B.

« Presejo de l' Centro », Kipdorpevest, 26, Antwerpen.